

Premio STIFTELSEN
pri rajto je vivrimedoj
 Administra oficejo
 PO Box 15072
 S-10465 Stockholm
 Sweden
 Telephone(08)7020340
 Fax(08)7020338
International code+46
 Fondinto kaj Prezidento
 Jakob von Uexkull
 Administra Direktoro
 Kerstin Bennett

GAZETARA DISPONIGAJO

Ne por publikigo antaŭ la 09.00
 merkrede, la 7^{-an} de oktobro 1992

HONORAJ KONTRIBUANTOJ POR LA PREMIOJ
 PRI RAJTO JE VIVRIMEDOJ EN 1992 DE HOMOJ,
 STREBANTAJ AL NOVA MONDA ORDO

La premioj de la Bangladeŝa Popola Centro de la Sano, la Finlandaj vilaĝanaj aktivuloj, la Guatemala organizanto de kampanjo por homaj rajtoj kaj la Amerikan kaj Ukraina serĉantoj de la vero pri Ĉernobil estis kun emfazo al la sano kaj la homaj rajtoj por ĉiuj, subvenciado, libereco de la informo kaj de la preciza scienco.

La premio pri rajto je vivrimedoj por 1992 de SKR 1 miliono (USD proksimume 185,000) estis dividita inter:

1. La Bangladeŝa organizo GONOSHASTHAYA KENDRA, fondita kaj ĝis nun gvidata de D-ro Zafrullah Chowdhury, kiu estas honorita "pro lia senprecedenca 20-jara reputacio en la subteno de la sano kaj la homa evoluo kaj precipe pro lia ŝlosila rolo pri la dekreto de la ekskluzive grava Medikamenta Polico, lia sukceso en produktado de altkvalitaj, malmultekostaj esencaj medikamentoj kaj lia emfazo al la virina sano kaj evoluo". La Ĵurio atentigas speciale sian subtenon por Chowdhury en lia nuna batalo kontraŭ potencaj fortoj en kaj ekster Bangladeŝ, kiuj strebas renversi la Medikamentan Policon kaj nuligi la atingojn de GK.

2. la Guatemala organizanto de kampanjo por homaj rajtoj Helen Mack, elektita "pro ekskluziva kuraĝo kaj persisteco en la streboj prezenti al la Justico la altnivelajn mortigantojn de ŝia fratino, kiu estis inspirinta la tutan regionon de

Centra Ameriko kaj estis ardiginta naciajn kampanjon en Guatemala la ekzistantan nepunecon de la politikaj mortigoj". La Ĵurio alvokis la mondajn organizojn por homaj rajtoj subteni la batalon de Mack por ke la farintoj de politika perforto en Centra Ameriko povu finfine esti prenitaj antaŭvide.

3. La usona sciencisto Profesoro John Gofman kaj la ukraina ĵurnalistino Alla Yaroshinskaya (la unuafoje aljuĝita premio pri Rajto je vivrimedoj en la eksa Sovetunio), honoritaĵ "pro iliaj klopodoj prezenti la veron pri la efikoj de la Ĉernobila plago malgraŭ la masiva oficiala diskreteco kaj la disvastigita misinformo de la internaciaj sciencaj laborgrupoj". La Ĵurio alvokis por plena libereco de informo pri la niveloj de radiado kaj ĝiaj efikoj sur la sano en la regionoj influitaj de la Ĉernobila akcidento, kaj por sendependa "Aŭtoritato de deĵoranto" por observi estontaj studoj tie.

La ricevinto de la Honora premio pri Rajto je vivrimedoj por 1992 estas la Finnlanda Movado de la vilaĝa agado (KYLATOMINTA), honorita "pro montrado, ke ekzistas dinamika, vivplivaloriganta alternativo al la provinca regreso, centralizo kaj popola senrajtigado, kio estas la normo en Eŭropo hodiaŭ". La Ĵurio konsideras, ke la Finnlanda Movado de la vilaĝa agado ne nur donas vivgravan lecionon de "subvenciado en ago" al la Eŭropaj landoj, sed ankaŭ potencon evidentecon al la Tria Mondo, ke vivkapabla, vibranta vilaĝa vivo ne estas malkunigebla al la evoluo.

La Premioj estis denove prezentitaj en la Sveda Parlamento la 9^{-an} de decembro, la tago antaŭ la prezentado de la Nobelaj premioj. (La premioj pri Rajto je vivrimedoj ofte estas indikataj kiel "Alternativa Nobela Premio".) Tiuj Premioj estis enkondukitaj en 1980 "por honoro kaj subteni praktikeblajn kaj multiplikeblajn solvojn de la plej urgaj problemoj stariĝantaj antaŭ ni hodiaŭ". La ideo venis de Jakob von Uexkull, sved-germana verkisto kaj filatela eksperto, kiu vendis siajn valorajn poŝtmarkojn por certigi la originalan doton. Von Uexkull eksentis, ke la Nobelaj Premioj estiĝis tre limigitaj kaj specialigitaj kaj ignoras multajn aferojn kaj vivnecesajn konojn por la supervivo de la homaro.

Gazetara Konferenco kun la premiitoj okazis en Stokholmo lunde la 7^{-an} de decembro 1992.

La milito kaj la armadkonkuro, la malriĉeco kaj la senlaboreco, la elĉerpado de la fontoj kaj la degradigo de la ĉirkaŭanta medio, la subpremo de la homo kaj la socia maljusteco, la nekonvenaj teknologioj kaj la potenca scienca kono, nemoderigitaj per etikaj, kultura kaj spirita regreso: tiuj estis la ofte elnombrataj kiel kritikaj problemoj de la nuntempa homaro. Prognostoj por ilia trairo en apokalipson ne estas neordinaraj. Ilia supermezureco kaj komplikeco kreas konfuzon kaj senton de senforteco.

La Premio pri Rajto je vivrimedoj estis enkondukita en 1980 por honori kaj subteni laboron, kiu honeste renkontas tiujn problemojn kaj kiu donas pionirajn solvojn por ili. De tiam 50 homoj kaj projektoj estas ricevintaj Premiojn pri rajto je vivrimedoj, elektitaj inter 400 proponoj de 60 diversaj landoj. La kolektiva komunikado de tiuj iniciativoj donas esperon kaj kuraĝigon. La hodiaŭaj problemoj estas nek nesolveblaj nek iliaj solvoj superas la rimedojn de la individuoj kaj de la malgrandaj grupoj de homoj, agantaj surloke kaj kolektive, mobilizantaj la energiojn kaj la talentojn de aliaj kaj laborantaj por la komuna bono. Grava celo de la Premio estas projekti tiun komunikon aldone por subtenado de la iniciativoj mem kaj por diskonigi la grevan konon kaj sperton, kiujn ĝi inkluzivas.

La Premio pri Rajto je vivrimedoj estas strebo stimuli disputon pri la valoroj, substrekante nian socion kaj celojn. Antaŭ ol demandi: "Kiel?", ni devas demandi "Por kio?". Kiam "la kono" duobliĝas ĉiun duan jaron, ni devas atenti pri la kvalito de la kono, kiun ni honoras kaj subtenas. La Premio estas strebo serĉi tiujn, kies kono gvidas al memrealigo kaj al realigo de la valoroj.

Tiuj, kiuj estas agnoskitaj laŭ tiu maniero estis forĝintaj la mallongedaŭrajn, materiismajn celojn de multaj okcidentaj scienco, teknologio kaj socio, bazitaj sur senrezona ekspluatado de la akumulitaj teraj fontoj, kaj plej ofte je minaco kaj detruo konsekvencoj. Ili estis la pioniraj agantoj aŭ remalkovrantoj de la principoj kaj la praktiko, radikitaj en la vizio de unu homaro, en scienco de persistemo kaj en etiko de justeco kaj toleremo, kiu akceptas nian rolon de prizorgantoj de la Planedo. Multo

de tio estas parto de la multjara prudento de niaj specioj kaj ankoraŭ vivas en multaj Triamondaj kaj indiĝenaj komunumoj, de kiuj la Okcidento havas multon por lerni.

Vivgrava aparteco de la Premio pri Rajto je vivrimedoj estas ĝia integra agmaniero al la provokoj de la nuntempo. Ĝi kunigas tiujn, kiuj laboras por paco kaj senarmado, por homaj rajtoj kaj socia justeco, por eltenanta ekonomika progreso kaj regenerado de la ĉirkaŭanta medio, kaj por homa evoluo, ĉu per plibonigo de la sano, la loĝejkonstruado kaj la klerigado, per kultura kaj spirita renovigo, aŭ per aldono al la stoko de la homa kono aŭ la bonaj teknologioj. La komplikeco de nia mondo postulas tian integran agmanieron. Ĝiaj bonefikaj rezultoj estis pruvitaj de multaj Premiricevintoj kaj Premikandidatoj. La tasko nun estas garantii la subtenon, la inspiron kaj la eksperton por ke tiuj rezultoj estu multiplikitaj. La Premio pri Rajto je vivrimedoj ekzistas por fari la ĉefan kontribuon al tiu tasko.

La Premioj pri Rajto je vivrimedoj estas prezentataj ĉiujare en la Sveda Parlamento en Stokholmo tagon antaŭ la prezentado de la Nobelaj Premioj. Alfred Nobel volis honori tiujn, kiuj "dum la pasinta jaro faris la plej grandan bonon por la homaro". En la sama spirito la Premioj pri Rajto je vivrimedoj strebas subteni tiujn, kiuj laboras por praktikaj kaj modelaj solvoj de la realaj problemoj starigantaj antaŭ ni hodiaŭ.

La Premioj estas prezentataj de la Fondaĵo Premioj pri Rajto je vivrimedoj, filantropo registrita en Svedio kaj kun reprezentantoj en Britio, Hindio kaj en Usono. Tio estas ligita kun neniam politikaj aŭ religiaj grupoj.

La ideo kaj la komenca financado venis de Jakob von Uexkull, sved-germana verkisto kaj filatela eksperto, kiu estas Direktoro de la Fondaĵo kaj estinta membro de la Eŭropa Parlamento.

Hodiaŭ la Premio estas financata parte de donacaj enspezoj kaj per donacoj de individuoj de la tuta mondo. La jare disponebla mono por premioj estas almenaŭ 150 000 US \$, kiuj estas dividataj inter kelkaj ricevintoj. La mono estas por specifaj projektoj, ne por persona uzo. Honora (ne mona)

Premio ankaŭ estas prezentata al persono, kies laboron la Ĵurio deziras honori kaj rekoni, sed kiu komence ne bezonis monan subtenon.

Ĵurio de la Premio pri Rajto je vivrimedoj

La ricevintoj estas elektataj de internacia ĵurianaro. Inter ĝia nuna membraro estas:

- Tani Adams, Koordinanto,
Greenpeace Latin America
- Monika Griefahn, Ministro pri la ĉirkaŭanta medio,
Hannover, Germany
- Birgitta Hambraeus, Membro de la Sveda Parlamento
- Sven Hamrell, Direktoro de la Fondaĵo Dag Hammarskjöld Foundation
- Thor Heyerdahl, Aŭtoro kaj esploranto
- Richard Jolly, Rajtigita plenuma Direktoro,
UNICEF
- Ilona Kickbusch, Vivstiloj kaj sano, WHO Europe
- Vithal Rajan, Dekano de Societo por evoluo,
India
- Albert Tevoedjre, M.P., Prezidanto de la Tutafrika
Centro por sociesploroj
- Margot Wallstrom, estinta Ministro de la Sveda
ministraro

Por pliaj detaloj kontaktu:

Premio pri Rajto je vivrimedoj:

Kerstin Bennett

(Administra Direktoro)

Telefono 08-702 03 40

Dato: La 7^a de Oktobro 1992

Right Livelihood Award:

Kerstin Bennett

(Administrative Director)

Phone 08 - 702 03 40

Andaluzio – el vido de Andaluzo

Emilio Moreno, Cádiz

(trad. R. Hauger)

Enkonduko

Tiu ĉi eseo estas la provo, plivalorigi la famekonatan flamenkon kontraŭe al la popularigo kaj malestimo, kun kiuj ĝi estis pritaksata preskaŭ ĉiam.

La intenco estas, klarigi la flamenkon, tiun kulturan esprimon de la andaluza gento, per la interpretado kiel ĝi ekestis el la origina "*cante jondo*", la pura, nur kantita flamenko. Kontraŭe al tiu profunda *cante jondo* evoluiĝis la *Sevillanas*, la *Tangos* k.a. nur pli malfrue per almeto de ritmaj movoj, instrumentaj transiroj kaj fine simbolaj gestoj kaj danformoj. Ni parolu do de la kvar bazaj elementoj de la flamenko: de la kanto, de la kastanjetoj, de la gitaro kaj de la danco, kiuj ĉiuj estas esprimiloj de ne interŝanĝebla kultura identeco.

Ni volas ankaŭ ekscii la radikojn, el kiuj la flamenko ekiris, radikoj, kiuj troviĝas en la historiaj komencoj de la andaluza gento, kaj kiuj la flamenkon nutras ĝis hodiaŭ. Ni neglektu la kliŝan aspekton de la flamenko kaj emfazu ties